

Florbukedoj memore al la Holokaŭsto



Lunde la 2-an de majo, en la holokaŭsta tago, okazis memorceremonio en Jad Vashem, Jerusalemo. Kiel en la lastaj kvin jaroj, inter la cent buknedoj (i.a. de la prezidento Peres, ĉefministro Netanjahu, vicedestro de la Kneset, ĉefo de la Sohhnut Natan Sharanski kaj urbestro de Jerusalemo Nir Barkat) estis la buknedo de Esperanto-Ligo en Israelo kaj de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi estis metita de Malka Zemeli kaj Amri Wandel. Estis interesa koincido ke la sekva en la bukned-vico estis la buknedo de judoj el Bjalistoko, kaj la antaŭa estis prezentita de Cvi Sefet, de la urbo Slonim, kies parenco estis Josef Kohen Cedek, unu el la pioniroj de Esperanto en Jerusalemo. Post la anoncado de la buknedo de ELI, alparolis nin profesoro de la universitato Ben Gurion, kiu metis la buknedon nome de la libiaj judoj, kaj rakontis ke de la infanaĝo li interesiĝas pri Esperanto, sed ne sciis ke troviĝas esperantistoj en Israelo. Siavice en la ceremonio en la palaco de nomoj Malka legis la nomojn de la familianoj de Zamenhof murditaj en la Holokaŭsto.

Amri Wandel

Prezidanto de ELI